

NORVEGA ESPERANTISTO

Esperantobladet

N-ro 1
JANUARO
1959

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
26-a (35-a) jaro
Monata

JARO DE JUBILEO KAJ LABORO

Komenciĝis jam la Zamenhofa jaro, la jaro de la 100-jara jubileo pri la naskiĝo de d.ro Zamenhof kaj jaro de la plej granda monda kampanjo en la historio de Esperanto.

La internaciajn aranĝojn de la Zamenhof-jaro gvidas Internacia Organiza Komitato, kies norvega reprezentanto estas John Selbekk, sekretario de NEL. La tuta kampanjo okazas sub la aŭspicioj de Internacia Patrona Komitato, en kiun eniris multaj alt-rangaj personoj de la scienco, literaturo, artoj, publika vivo, kulturo kaj edukado. La plenan liston de la membroj vi trovos en la Januara numero de la revuo *Esperanto*, mi menciuj nur la norvegajn membrojn: s.roj Birger Bergersen, ministro pri Eklezio kaj Edukado, Halvard Lange, ministro pri Ekstero, Trygve Lie, estinta ĝenerala sekretario de UNO, d.ro Johan Falkberget, verkisto, Thor Heyerdahl, verkisto, gvidinto de la Kon-Tiki-ekspedicio, Sigurd Hoel, verkisto, Odd Nansen, arkitekto.

En *Norvega Esperantisto* por septembro 1958 mi publikigis specon de antaŭparolo pri la Zamenhofa jaro. Mi petas vin relegi tiun artikolon. Estas nun la momento por substreki la diversajn aktivecojn plenumotajn en la kadro de la Baza Programo (kies plenan tekston vi trovos en la decembra n-ro de la revuo *Esperanto*).

UEA. sendos la necesan materialon al interŝtataj organizaĵoj, internaciaj presagentejoj

kaj diversaj aliaj instancoj kaj al la landaj asocioj. La landaj asocioj siavice provizos per materialo la aktualajn enlandajn instancojn kaj la lokajn Esperanto-klubojn kaj membrojn.

Sed la plej grava instanco en la tuta laboro estas, nun kiel ĉiam, la kluboj kaj la unuopaj membroj, ĉu klubanoj, ĉu rektaj membroj.

Ĉiu klubo devas en 1959: 1) aranĝi informparoladojn pri Esperanto en aliaj organizaĵoj, ekz. en gimnazia asocio, filatelista klubo k. t. p.; 3) jam nun plani solenan publikan kunvenon en la aŭtuno; 4) klopodi por publikigo de la gazeta kurso en iu loka gazeto; 5) fondi Esperantoklubon en najbara urbo aŭ loko; 6) varbi ĉiun klubanon abonanto al *Norvega Esperantisto* kaj laŭeble multajn klubanojn Individuaj Membroj de UEA.

Ĉiu klubano kaj rekta membro devas varbi minimume unu novan esperantiston. Se ĉiu faras sian devon tiurilate, la nombro de esperantistoj duobliĝos en unu jaro! Kaj ĉiu esperantisto devas aboni minimume unu Esperanto-gazeton, ĉar nur tiel li estos sufiĉe informita pri Esperanto por esti vera ambasadoro por nia afero en sia medio. Efektive ĉiu esperantisto devus en la daŭro de la Zamenhofa jaro fari almenaŭ unu prelegeton pri Esperanto aŭ publikigi unu informon pri nia afero en gazeto aŭ en faka revuo. NEL. havigos al vi materialon. Multaj facile (daŭr. p. 2)



D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof

Perloj de Baghy

En la nova libro de Julio Baghy, «Songe sub pomarbo» (pri kiu aperos recenzo en la februara numero) estas tre multaj versoparoj, kiuj estas veraj perloj, facile memoreblaj kaj proverbe citindaj. Jen kelkaj malmultaj ekzemploj:

Se oran blondon jaroj arĝentumos,
la harojn or' memora reorumos.

*

La riĉo estas kiel la pipfumo:
ĝi iĝas nevidebla en mallumo.

*

Ĉar kiu nur al korpa dikto cedas,
neniam amas, sole rason bredas.

*

Edena frukto, la ŝtelita pomo,
la homan scion gvidis ĝis atomo.

*

Kiam sentoj pleje misas,
virinoj, diplomatoj — interkisas.

«Jeg synger om en mand»

Tr. R. skribas en numero 7 de N. E. (sept.) ke li supozas, ke Wessel volis, ke oni legu la tutan versajon laŭ «viraj hemistikoj». Poste li skribas, ke la sepa verso laŭ «viraj hemistikoj» tiel sonas (sonu?): «Jen kant' pri vir', inflam' de poezi'». Hemistiko (duonverso) estas tiel klarigata en P. V.: «Ĉiu el la du partoj de verso ĉiuflanke de la cezuro (spirpaŭzo)». La verslinio: «Ni ĉiam pri la vir' / kantadis laŭ inklinio», estas dividita en du hemistikoj (kun cezuro en la mezo), kiuj havas viran *ritmon*, ĉar la akcento estas sur la lasta silabo de la piedo, takto (jamba ritmo). Do la du hemistikoj havas viran *ritmon* (jamban), kelkfoje la dua hemistiko finiĝas per kromsilabo (jambino). Se vi do studas la konstruon de la tuta poemo, vi trovos, ke ĉiuj komencaj hemistikoj de ĉiu verslinio ĉiam iras laŭ vira ritmo, krom la sepa, kiu havas aldonitan senakcentan silabon, kiu do (ŝajne) rompas la ritmon; malgraŭ tio la resto de la linio (la dua hemistiko) kompensas tiun mankon, komencante per akcenta silabo, anstataŭ per kutime senakcenta: «Mi'a he'misti'k». Malgraŭ la mislokado de la cezuro, vi tamen povas legi la tutan linion jambe. La sepa linio de Tr. R.: «Jen kant' pri virin'; flam de poezi' ho, tre», estas tute senritma, dum tiu de W. tute regule havas nur jambojn (Jeg synger om en kone. — Hemistichen faldt). Ĉi tie okazis nur tiu saĝo, ke la cezuro transportiĝis unu silabon pli posten. Legu nun la sepan kaj okan linion de la traduko de Fridén:

Mi kantas pri virin/o. — Mia hemistik'
ne estas laŭ regul' / nun diras la publik'.

povus ankaŭ organizi malgrandan kurseton en sia faka medio.

Kaj nun, karaj gelegantoj, leginte ĉi tiujn liniojn, bonvolu ne formeti la gazeton kun kontenta ĝemeto, forgesante kion vi ĵus legis. Sed bonvolu relegi la liniojn pri viaj taskoj, pripensu ilin, kaj decidu ke ankaŭ vi mem faros vian eblon por progresigi Esperanton dum la Zamenhofa jaro. Sen la subteno de la unuopaj membroj ankaŭ la estraroj kaj la organizaĵoj nenion povas fari. Kun via subteno kaj kunlaboro ni povos fari miraklojn.

C. Støp-Bowitz.

GRAJNOJ EN VENTO

Alvoko de Grajnoj en Vento, la interlernejaj rondoj, al tutmondaj ĝeinstruistoj kaj gvidantoj de Esperanto-kursoj por infanoj.

De jam tri jaroj funkcias la infanaj rondoj Grajnoj en Vento. Ankaŭ via klaso, via grupo, devas koni la ĝojon partopreni en nia lerneja riĉoplena interŝanĝo. Dank' al kunlaborado en rondo Grajnoj en Vento, per unu fojo vi kontaktiĝas kun multaj klasoj en diversaj landoj. En marto, junio, novembro, ĉiu rondo eldonas novan kajeron kun riĉa enhavo de infanaj verkoj. La formato de la kajeroj, por ĉiuj rondoj estas normaligita je 21 × 29,7 cm kio ebligas okazan kunlaboradon kun najbara rondo.

La rondoj Grajnoj en Vento ne prizorgas privatan korespondadon inter infanoj, sed nur eldonas de infanoj libere kaj originale verkitajn tekstojn kaj desegnaĵojn. La eldonnombro estas 20 ekzempleroj.

Tiaj altvaloraj kajeroj kontribuas

- * al interamikiĝo de tutmondaj infanoj
- * al disvastiĝo de Esperanto ĉe la geknaboj
- * al enkonduko de Esperanto en la lernejojn
- * utilas kiel propagandiloj kaj atestiloj pri la valoro de la internacia lingvo.

Bonvolu skribi al ĉi-suba adreso:

- a) Mi deziras kunlabori en via entrepreno, sendante 3-foje jare tekstojn kaj desegnaĵojn je 20 ekzempleroj.
- b) Mi deziras kunlabori en via entrepreno kaj estas preta funkcii kiel *gvidanto* de nova rondo.

Nepre aldonu — se estas eble en via lando — internacian respondkuponon, ĉar ju pli la sendependa entrepreno disvastiĝas, despli malriĉa ĝi fariĝas.

Adreso: Grajnoj en Vento, Marcel Erbetta, rue des Pins 66, Bienne-Biel 7, Svislando/Suisse.

Novajĉoj de ELDONEJO ESPERANTO

Julio Baghy:

SONĜE SUB LA POMARBO

Triakta lirika komedio en ses fantaziaj bildoj.

Prezo kr. 16,—

Sienkiewicz:

QUO VADIS

Romano de la antikva Romo. Tradukita de Lidja Zamenhof.

Prezo kr. 22,50

ESPERANTA ANTOLOGIO

Poemoj 1887—1957

Redaktis William Auld

Kun komentario kaj biografietoj. — La plej grava poezio de nia literaturo kolektita en unu volumo de 640 paĝoj.

Prezo kr. 32,—

Mendu ĉe **ESPERANTOFORLAGET A/S**
Boks 942, Oslo. Poŝtĝiro 100 31.

NORVEGA ESPERANTISTO

ESPERANTOBLADET



Redakcio:
Johan Hammond Rosbach.
Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio:
Boks 942, Oslo.

Ekspedicio:
Esperantoforlaget A/s,
Boks 942, Oslo.
Poŝtĝirokonto 100.31.

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—.
Anoncoj: 1/1 paĝo kr. 150,—; 1/2 p. kr. 75,—; 1/4 p.
kr. 38,—; 1/8 p. kr. 19,—; 1/16 p. kr. 10,—.

Zamenhofa jaro

Al ĉiu vera esperantisto la jaro 1859 havas specialan valoron — ĉar tiam naskiĝis D-ro Zamenhof.

Ĉiu vera esperantisto tial sentas ne nur devon, sed ankaŭ bezonon, festi la 100-jaran jubileon nun en 1959.

Kaj ĉar ĉiu vera esperantisto estas pioniro en idealisma movado, la festado de jubileo tia okazas ne nur, eĉ ne ĉefe, per pompo kaj festenoj kaj grandiozaj frazoj.

La plej bona — kaj plej inda — maniero, kaj ankaŭ tiu, kiu plej konvenas al la spirito de Zamenhof mem, estas fervoro kaj laboro, fervora laboro.

Ni petas vin atente legi la frontpaĝan artikolon — kaj agi. La esperantistoj devos havi kaŭzon gratuli unu la aliajn pro la jubileo!

Frostavallen denove

SVEDA SOMERA SEMAJNO aranĝos ĉijare 9.—16. aŭg. denove sian altkvalitan prelegsemajnon kaj elektis la temon:

LANDOJ — POPOLOJ

kun atento pri orienta kaj okcidenta kulturaj valoroj.

Pri la aktuala agadtemo de UNESKO prelegos Prof. D-ro Ivo Lapenna, Prof. D-ro N. Kawasaki, doc. S. Pragano, lic. Tib. Sekelj.

La kultursemajno okazos tuj post la kongreso en Varsovio, kaj estos eble partopreni ambaŭ aranĝojn.

Informojn kaj aliĝilojn oni petu ĉe s-ro Jan Strømne, Amiralsgatan 36, Malmö, Svedujo. Rekomendinde estas aliĝi tre frue.

Famaj personoj diras:

«Eĉ se la homaro restos indiferenta kontraŭ la nobleco en ĝiaj penadoj, — eĉ se ĝi preterlasos uzi ĉi-tiun verkon de materia kaj kultura progreso, kiun Zamenhof donacis al ĝi, — la nomo Zamenhof forgesiĝos tamen neniam, ĉar la scienco konservus ĝin.»

Camille Aymonier
(franca profesoro)

Komitato de Eŭropaj urbestroj kaj magistratoj por esploro pri Esperanto

Prezidanto:

Cefurbestro Franz Stein en Mainz, Germanujo.

Membroj:

La urbestroj kaj magistratoj de jenaj urboj:

AŬSTRUJO: Eisenstadt, Graz, Klagenfurt, Knittelfeld, Wien, Wiener-Neustadt, Wörgl. — BELGUJO: Corbesse — BRITUJO: Nottingham — DANUJO: Esbjerg — FRANCUJO: Dijon, Mulhouse, St. Hilaire-Petitville — GERMANUJO: Aachen, Dortmund, Köln, Mainz, Neustadt, Rüsselsheim — GREKUJO: Patras — ITALUJO: Alessandria, Bologna, Mondovi, Nogara, Torino, Varese, Verona, Vicoforte — NEDERLANDO: Arnhem, Den Haag — NORVEGUJO: Hamar, Mo i Rana, Trondheim, Sarpsborg — SVEDUJO: Gotenburg, Lund, Uppsala. (37 urboj en 11 eŭropaj landoj)

Dum la somero de 1958 la Komitato faris enketon pri Esperanto forsendante demandilojn al 2874 urboj en Aŭstrujo, Belgujo, Britujo, Danujo, Francujo, Germanujo, Grekujo, Irlando, Islando, Italujo, Luksemburgo, Monako, Nederlando, Norvegujo, Svisujo kaj Turkujo.

669 urbestroj, do 23 %, respondis al jenaj demandoj:

	jes	ne	sen res- pondo
I			
Ĉu vi opinias, ke la diverseco de la lingvoj en Eŭropo malhelpas la ekonomiajn kaj kulturajn rilatojn de la nacioj, kaj ke tial estas dezirinde, interkonsenti pri komuna lingvo?	581	72	16

II			
Ĉu vi opinias, ke la nacio, kies lingvon oni elektus, havus specialajn kulturajn kaj ekonomiajn avantaĝojn, kontraŭ kio protestus la aliaj nacioj?	517	123	29

III			
Ĉu vi opinias, ke la internacia lingvo Esperanto — kiu pro ĝia facileco povas esti lernata en plej mallonga tempo kaj pro ĝia neŭtraleco ne ofendas la naciajn sentojn de kiu ajn popolo — povos doni taŭgan solvon al la lingvo-problemo?	545	95	29

IV			
Ĉu vi konsentas, ke la Komitato de Urbestroj sub la prezido de cefurbestro Stein en Mainz faru la necesajn paŝojn ĉe la Eŭropa Konsilantaro aŭ ĉe aliaj eŭropaj institucioj resp. ĉe iliaj membroj-ŝtatoj kun la celo			


a) ke kompetenta komisiono objektive esploru la avantaĝojn, kiujn la Internacia Lingvo Esperanto prezentas por la solvo de la lingvo-problemo en Eŭropo			
b) ke ĝia uzo por la internaciaj rilatoj fariĝu ĝenerale tiel, ke samtempe estu protektata la rolo de la lingvoj de tiuj nacioj, kies lingvoj ne estas vaste disvastigitaj?	586	56	27

Do resume kaj meznombro: % 83,3 - 12,9 - 3,8

Mainz, la 1an de decembro 1958.

Franz Stein, cefurbestro
Prezidanto de la Komitato

TIA ESTAS VARSOVIO



La Kongrespalaco de la 44-a U. K. en Varsovio.

Ni komencu per mallonga geografie-historia informo.

Varsovio situas ĉe Vistulo — la plej granda polanda rivero. Pigraj vaste disverŝigaj akvoj de nia «reĝino» de riveroj, fluantaj tra la mazovia ebenaĵo, proksimiĝantaj al sufiĉe alta eskarpo ĝuste en la loko, kie fondiĝis Varsovio.

Sur plata teraso, etendiĝanta malantaŭ la eskarpo direkte al okcidento, sur la maldekstra bordo de la rivero, disvolviĝis en daŭro de jarcentoj Varsovio.

La unuaj historiaj mencioj pri nia urbo devenas el la duono de la XIII jarcento, kaj la malnova historia parto de la urbo reprezentas tipe gotikan urbanistan strukturon. Sur la dekstra, malalta bordo disvolviĝis la antaŭurbo Praga.

La vasta, kaprica rivero iĝis grava obstaklo en la evoluo de la maldekstra kaj dekstraborda Varsovio kiel unueca urborganismo. Tial do Praga konservis ĝis la lasta tempo klaran stampon de aparteco — kvazaŭ de provinca urbo rilate al Varsovio — la ĉefurbo. En la jaro 1939, kiam falis sur Varsovion la unuaj ruinigaj bomboj, ĝi nombris rondcifere 1 200 000 loĝantojn. El ili $\frac{4}{5}$ loĝis kaj laboris sur la maldekstra bordo. La sieĝo kaj defendo de Varsovio en la jaro 1939, la varsovia ribelego en la jaro 1944 kaj fine la sistema, eksterma agado de la okupanto post la malvenko de la ribelo, domaĝigis ĉefe la maldekstrabordan Varsovion.

Laŭ la ordono de Hitler la urbo devis malaperi de sur la tersurfaco. La ordono estis realigita; tial kiam post la liberigo de la urbo komencis sur neĝ-

kovritaj vojoj revenadi — en januaro de la jaro 1945 — la elpelitaj de la okupanto loĝantoj, la urbo estis komplete ruindezerto, tiriĝanta sur multaj kilometroj.

La unuaj provoj sumigantaj la domaĝojn montris, ke la maldekstraborda parto estis detruita je 85 %. Praga iom malpli.

Ni komencis la rekonstruadon per fosado de interkrutejaj trairejoj inter ruinaĵamasoj, sur la vojoj de antaŭaj ĉefstratoj de Varsovio — Marszalkowska, Nowy Swiat, Aleo Jeruzalema.

Pli malpli en la duono de 1945 la loĝantaro de la ĉefurbo nombris kvaronmilionon. Oni loĝis ie ajn, sed funkciis la lernejoj — la lecionoj okazis en parkoj aŭ sur la ruinamasegoj. La unua «restoracio» estis establita en truigita kiel kribriilo tramvagono — ie sur la Marszalkowska strato.

Ni rekonstruadis Varsovion kaj ŝanĝis ĝin — kiel oni kelkiam kun fiero diris — en unu grandan konstruoplacon. Tiu granda ĉielatinga konstruoplaco ne faciligis kaj ĝis nun ne faciligas la vivon de la loĝantoj en la ĉefurbo. Kaj la loĝantaro pliiĝis en surpriziga rapideco. Antaŭ kelkaj monatoj ĝi superis milionon. La urbo releviĝis por nova vivo. Ne tia, kia antaŭe; ŝanĝita, vastaj stratoj, novaj placoj, kelkcento da hektaroj da parkoj laŭlonge de Vistulo, novaj loĝejoj kvartaloj sur la ruinoj de porluigaj, dom-alaj konstruaĵoj kaj kortoj putsimilaj.

Alia urbo — sed tamen la sama. La samaj homoj kun la konata mokema «varsovia» spritaĵemo, la samaj kiel antaŭe ŝtondometoj kaj kolomboj sur la Vendoplaco de la Malnova Urbo.

La rekonstruitaj antikvaj domoj de Malnova Varsovio estas forta ligilo kun la pasinteco. Novaj porloĝejoj konstruaĵoj, novaj varmagazenoj aŭ lernejoj — kelkiam belaj kaj kelkiam simple malbelaj — ili estas tamen belaj kaj kelkiam simple malbelaj — ili estas tamen sume jam ne nur antaŭsigno, sed parto de granda, nova urbo. Urbo, kiu jam ne kuracas siajn militvundojn, sed disvolviĝas plu, kreskas, vivas.

Post 10—12 jaroj Varsovio nombros 1 400 000 loĝantojn. La urbanistoj skizas planojn por plua evoluo. Laŭlonge de Vistulo — konforme al la natura strukturo — ekestos novaj loĝejoj kvartaloj. Dis-



Monumento al la nacia poeto A. Mickiewicz en Varsovio

volviĝos la nuntempe konstruitaj industriaj kvartaloj. Nova fanduzino de nobla ŝtalo estas konstruata, fabriko de porpersonaj aŭtoj jam funkcias. En la okcidenta industrio kvartalo disvolviĝas la radiofonia industrio. Kraĵono direktita per la mano de urbanisto desegnas pli kaj pli novajn domarojn kaj kvartalojn. Novaj parkoj kaj ringo da arbaroj ĉirkaŭ la ĉefurbo. Jam sur pluraj fragmentoj de tiu ringego kreskas freŝe plantitaj arboj. Ni desegnas novajn pontojn, aerodromojn por grandaj pasaĝeraj jetoj kaj en la urbomezo — por helikopteroj.

Apenaŭ pasos kvarono de jarcento — Varsovio havos du milionojn da loĝantoj. Tia urbego bezonos rapidmovan subteran fervojon. Ĝi cetere estas bezonata jam multe pli frue, ĉar la trafiko kaŭzas nun preskaŭ la plej multan klopodon tiel al la loĝantoj kiel al la konstruantoj de Varsovio. Ni posedas tre malmulte da tramoj, trolebusoj kaj aŭtobusoj. Sed ĉijare la unuan fojon ĉiuj miaj tri knaboj iras al la lernejo en la sama horo. Antaŭ unu jaro eĉ la plej malsuperaj klasoj laboris je du ŝanĝoj. Tiun mankon ni iom plimildigis.

Ankoraŭ nun kelkmiloj da familioj loĝas en ne-tolereblaj kondiĉoj, en ruinoj aŭ en mansardoj — sed ĝi estas la lasta kvinjaro, dum kiu tiaj loĝejoj havas ekzistorajton.

Ni intencas konstrui multe da novaj domoj — simplaj, helaj, koloraj. Ni volas konstrui rapide. Jam hodiaŭ en kvar punktoj de Varsovio ni muntas loĝejajn konstruaĵojn el grandaj, antaŭfabrikitaj elementoj, preparitaj en novfondita fabriko en nova industria kvartalo — en Zeran. Tiaj konstruaĵoj estas ĉiam pli kaj pli multaj. La konstruistoj inventas ankoraŭ alian, novan tipon de konstruo — ni ĝin aplikos venontjaro je la konstruaĵoj en la kvartalo Bielany.

Vespere sur kelkaj stratoj estas ankoraŭ mallume. Malofte oni ankoraŭ vidas neonon. Sed ne estas jam ruĝaj amasoj da rubaĵo kaj ruinaĵoj. Ruĝas nur la novaj muroj, cetere ne ĉiam ĝustatempe stukitaj.

Kvar novkonstruitaj pontoj kunkroĉis Praga-n kun Varsovio, la konstruado de la kvina ni komencos en la venonta jaro. En Praga konstruiĝis sportstadiono por 80 000 spektantoj. Praga ne plu estu provinca antaŭurbo — sed por tio oni devas havi paciencon ankoraŭ dum kelkaj jaroj.

Estas vero, ke havi paciencon estas por ni — varsovianoj — tre malfacile. Tro malrapide kreskas por ni la arboj en la Parko de Kuturo. Tro malrapide finkonstruiĝas la tuto de la Mezurbo ĉirkaŭ 8 kv. klm.

Ne malofte, veturante kun gastoj el eksterlando tra la stratoj de Vasovio, mi kaptas min je tio, ke al mi estas malagrabla, ke preskaŭ sur ĉiu strato estas ankoraŭ io konstruata, io fosata... ke preskaŭ ne ekzistas stratoj komplete finkonstruitaj... Sed kiam la gasto komencas dubeme balanci la kapon, ke la konstruaĵoj, kiuj staras, ne estas novkonstruitaj, ke ili ne estis detruitaj — kaj kiam mi montras al li albumon kun fotografiaĵoj — kiel estis — tiam mi ofte aŭdas rimarkon plenan de miro.

Nekredeble, ke tio estis apenaŭ dek jarojn antaŭe..

Ing. ark. K. Marczewski
Fotoj el la arkivo de la semajna
revuo «Stolica» / Ĉefurbo / .

Kiel Antaŭe

(COME PRIMA)

Esperanta teksto: Muziko: S. Taccani —
(el la itala): Henry Fridén V. di Paola.

Itala teksto:
M. Panzeri

Strofo:

*La nokto, kiel tiam, dolĉe trankvilas,
la luno brilas
kaj vi kun ĝi.
Mi sentas min konfuzita, mi ne komprenas,
la vortoj venas
nur tiel ĉi:*

Ritornello:

*Kiel antaŭe mi vin amos kaj eĉ pli.
Mian vivon al vi tute donos mi.
Ŝajnas sonĝo vin revidi, vin karesadi,
viajn manojn premi forte al mia kor'.*

Refreno 1:

*Estu mia tuta mondo, amu min,
mi neniun tiel amas kiel vin.
Ĉiun tagon kaj momenton
dolĉe diros mi al vi:
«Kiel antaŭe mi vin amos kaj eĉ pli.»*

(Ripetu la Ritornello, poste al Refr. 2)

Refreno 2:

*Kiel antaŭe mi vin amos kaj eĉ pli.
Mian vivon al vi tute donos mi.
Ĉiun tagon kaj momenton
dolĉe diros mi al vi:
«Kiel antaŭe mi vin amos kaj eĉ pli.»*

Fino:

Kiel antaŭe mi vin amos kaj eĉ pli!

! Ankoraŭ neniun
plaĉis al ĉiu...

Grava novaĵo

Gramofondisko kun modela elparolo

Mikrokanela disko de 45 pominutaj turniĝoj, nerompebla, daŭrante entute 7 minutojn. La registrita teksto estas simpla kaj taŭga eĉ por komencantoj. Ĝi enhavas la esperantan tekston de la unuaj 6 lecionoj de franca koresponda kurso. Presita teksto akompanas.

Provizora prezo kr. 10,—
(necerta pro la franca valuto)

Mendu ĉe

ESPERANTOFORLAGET A/S
Boks 942, Oslo. Poŝtĝiro 100 31.



44-a Universala Kongreso de Esperanto

Varsovio — 1.—8. aŭgusto 1959 — Pollando

JUBILEA ZAMENHOFA JARO

Sub honora protektado de la Ministro-Prezidanto de
Pola Popola Respubliko JOZEF CYRANKIEWICZ

ADRESO

Por korespondado sufiĉas la adreso: 44-a Universala
Kongreso de Esperanto, Varsovio, Pollando.

BANKO

Narodowy Bank Polski, Warszawa, VII. OM. n-ro
1531-9-525.

HONORA KOMITATO

Czesław Wycech, Marŝalo de la Pola Parlamento
Stanisław Kulczyński, prof. Prezid. de la Pola Demok-
ratia Partio kaj de la Tutpollanda Paca Komitato
Tadeusz Kotarbiński, prof. Prezidanto de la Pola Aka-
demio de Sciencoj

Władysław Bienkowski, Ministro de Klerigado
Tadeusz Gałiński, Ministro de Kulturo kaj Artoj
Stefan Zolkiewski, Ministro de Superaj Lernejoj
Zygmunt Dworakowski, Prezidanto de la Ĉefurba
Konsilantaro en Varsovio

Stanisław Turcki, prof. Rektoro de la Varsovia Uni-
versitato

GLUMARKOJ

La Loka Kongresa Komitato alvokas la esperantist-
ojn tra la tuta mondo vaste aĉeti la kvarkoloran
jubilean kongresan glumarkon. Ĝi estas mendebla je
prezo de 0,25 US. dolaroj por folio de 25 markoj ĉe
la Landaj Asocioj aŭ ĉe: 44-a Universala Kongreso,
Varsovio.

POSTKONGRESO

La Loka Kongresa Komitato elektis Krakovon kiel
postkongresan urbon 9.—12. aŭgusto 1959. La post-
kongresa ekskurso okazos kunlige kun la postkon-
greso.

JUNULA VESPERO

La Loka Kongresa Komitato decidis, ke dum la
Universala Kongreso okazu Junula Vespere dediĉita
al la esperantista junularo.

JUNULAR-KUNVENO

La 15-a Internacia Junularkunveno en Gdansk,
Dancigo, anoncas jenan provizoran programon: Inter-
amikiĝa vespero, solena inaŭguro, diservoj en Esper-
anto, vizitado tuttaga de Triurboj, aŭtobusekskurso
tra la regiono, jaĥtekskurso, kulturaj prelegoj, ora-
tora konkurso, folkloraj kaj dancvesperoj, laborkun-
sidoj de TEJO, renkontiĝo kun loka neesperantista
junularo, solena fermo, forveturo de partoprenantoj
al 44-a Universala Kongreso en Varsovio.

BLINDUL-KONGRESO

La 29-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperant-
istoj okazos de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1959 en
la kadro de la Universala Kongreso.

KUNVENO de M. E. M.

Mondpaca Esperanto-Movado anoncas sian Kongre-
son en la kadro de la Universala Kongreso.

BIOLOGIA JARO

Parto de la prelegoj de Internacia Somera Univer-
sitato, kiuj okazos en Varsovio, estos dediĉitaj al
temoj en la kadro de la Internacia Biologia Jaro, kiu
estos festata en 1959 en la tuta sciencista mondo,
honore al la 150 naskiĝdato de Darwin.

AFIŜO

La Ŝtata Turisma Komitato en Pollando eldonis
grandan nigre-blankan afiŝon pri Varsovio, 70 × 100
cm, kun dukolora teksto en Esperanto. La afiŝo estas
ricevebla ĉe la Landaj Asocioj aŭ, en landoj kie ne
ekzistas Landa Asocio, de: 44-a Universala Kongreso
de Esperantistoj, Varsovio.

STATISTIKO

Arabujo 1, Argentino 1, Aŭstralio 2, Aŭstrujo 6,
Belgujo 9, Brazilo 3, Britujo 24, Bulgarujo 5, Dan-
lando 16, Etiopio 1, Finnlando 3, Francujo 41, Ger-
manujo 40, Hispanujo 5, Islando 2, Italujo 26, Japan-
ujo 1, Jugoslavio 24, Kanado 1, Maroko 1, Meksikio 1,
Monako 5, Nederlando 6, Norvegujo 3, Novzelando 1,
Pollando 137, Sovetunio 2, Svedujo 27, Svisujo 8,
Sudafriko 1, Urugvajo 1, Usono 3. Entute 407 el 32
landoj. (Pasintjare 316 el 25 landoj)

NOVJAR-SALUTOJ

*La Urso, Sarpsborg, deziras al ĉiuj konatoj
feliĉan novan jaron!*

Johan Hammond Rosbach, Ragnar Kjønnigsen, Al-
fred Tomte, Terje Myhre, Dagny Rosbach, Karsten
Langsholt, Vidar Vik, Inger-Johanne Fallang, Thure
Resberg, Per Rønning Hansen, Sigrid Birch Olsen,
Ole Halvorsen, Sissel Langseth, Svein Queseth, Gerd
Nilsen, Anne Lise Bjørnstad, Odd Smedstad, Ludvig
Lindskog, Oddmund Hammerstad, Terje Ellefsen, Ro-
ald Birch Olsen, Vidar Hansen.

Bonan prosperigan novan jaron al ĉiuj konatoj!
Esperanto-klubo Ascendo.

Feliĉan novjaron deziras Leif Sandberg al ĉefo de
jaz-orkestro, s-ro Borislav Bonev, Sofia, Bulgarujo.

Vokas vortoj de l' vero

*Ne ekzistas landlimoj por la vera frataro,
la vasta frataro tra la tuta la mond', —
nek monto nek valo, nek lando nek maro
dividos nin longe de frata la rond'.*


Spontane kaj infane.

*Fileto (demandanta sian patrinon): Kial la patro
estas senhara?*

Patrino: Ho, — jes, ĉar, — ĉar li pensas tre multe,
mia karulo.

Fileto: Jes, — panjo, — sed kial vi havas longajn
harojn, panjo?

Patrino: Nu, iru for kaj ludu, mi petas ...



EL NIAJ KOLEGOJ

Nia Norvega Esperantisto estas parto de la neŭtrala Esperanto-gazetaro, kaj tial ne propagandas nek politikon, nek religion. Tial ni povas esti io por ĉiu. Tio kompreneble ne signifas, ke ni ne povas publikigi artikolon pli-malpli politikan, aŭ tradukon de iu himno.

La Esperanto-movado tamen havas ankaŭ neneŭtralan gazetaron. Ĉi-foje ni vizitu tri religiajn:

Espero Katolika estas la organo de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. Tiu gazeto en sia n-ro 463 (novembro 1956) diras iom pri Romo kaj Esperanto: «Romo aprobas Esperantan propagandon». La redaktoro informas pri fondigo de «Papa Asocio de la Religiaj Vokacioj», kiu verŝajne astas iu katolika propaganda centro. «Kompreneble mi tuj sendis la Esperantajn Prospektojn pri nia Kongregacio, akcentante ke per la Lingvo Internacia mi faras propagandon sur tereno internacia. Ĉiujare mi devos sendi detalan raporton pri tiu propagando al la Sta Seĝo.» Sed li ne nur alsendas, li ricevis respondon: «Vatikano 3.3. 1956. Tre Estimata Frato. Mi estas feliĉa sciigi al vi, ke la Sta Patro sentis sin tre tuŝita pro viaj afablaj vortoj, kaj pro via internacia propaganda materialo kiun vi sendis en via lasta letero. Kiel aproba signo pri tio la Sta Patro ŝarĝas min transdoni al vi Lian dankon, kaj elkore Li donas al vi kaj al ĉiuj membroj de via Instituto la favoron de la Apostola Beno. Akceptu tre Estimata Frato, la certigon pri mia religia sindono. A. Dell' Aqua. Subt.»

Nun ja nova papo elektigis. Ni kuraĝas tamen esperi, ke la sinteno rilate al Esperanto ankoraŭ restos favora.

Kiel komuna protestanta organo funkcias «Dia Regno». La sveda membro de Kristana Esperantista Ligo Internacia, Erik Carlen, en n-ro 3/1958 pledas por la kredo fanatika en sia artikolo «La lingvo kiu relevigis el inter la mortintoj»:

«Mi estas ĝoja, ke dum mia vivo okazis la plenumiĝo de tre grava kaj neverŝajna profetaĵo de la Biblio. La dispelitaj judoj, vivintaj inter multaj popoloj reiris al la promesita landa, la lando de iliaj prapatroj kaj tie laŭ la profetoj denove estiĝis popolo kaj nacio. (Rigardu Jer. 23, 3-8. Jer. 31, 31-37. Jer. 33, 14-26. Jeh. 11, 17. Zeĥ 8, 20-23). Tio estas miraklo sed ĝi montras la verecon de la Dia vorto...» La sekvanta parto de la artikolo temas pri la judo Eliezer Ben Jehuda. Kiel infano lia amo al hebrea lingvo vekigis pere de la libro Robinson Crusoe, kaj: «Li iris pli longe ol la fondinto de la cionismo kuraĝis, la popolo en la hejmlando parolos la saman lingvon kiel Moseo, David kaj la profetoj. La komuna signo de nacio ja estas la lingvo. La juda popolo posedis lingvon, sed ĝi ne parolis ĝin».... «Terura estis la fanatiko de Ben Jehuda. Li laboregis super antikvaj libroj por trovi novajn vortojn. Granda aro da lingvaj sciencistoj dum jardekoj ne estus povinta fari, kion li faris.» Poste Carlen tiras paralelon kun la ago de Esperantistoj, konkludante. «Kara leganto. La historio de Ben Jehuda kaj la venko de la hebrea lingvo instigis min, fortigis mian kredon pri Esperanto, faris min pli fanatika. Por ke okazu al vi same, mi skribis tion. Ĉar nur kredo fanatika povas venki la mondon.»

La tria de la triopo estas «La Plugilo», bulteno de la Bruderhofaj Komunumoj. Redakcie tiu bulteno skribas por La Civitaneco (n-ro 2/1958): «Ekonomie ĉiu nacio dependas de la aliaj — en la militado la

faroj de unu nacio tuŝas la tutan mondon. Hodiaŭ la homaro pensadas en terminoj de kunekzistado — prefere ol pri la paco kaj harmonio. Ĉu tial ne estas nun la tempo por ekzameni la bazon de nia socio? Antaŭ du jarmiloj Jesuo diris al ni, ke la fundamento estas nevera. Li komparis ĝin kun la konstruado de domo sur sablo.» Tiu sabla bazo estas, diras la bulteno, ĉiu memamo, ĉiuj postuladoj pro si mem kaj siaj infanoj, la obstino en siaj rajtoj. Sed aliflanke: «Jesuo postulas kompletan revolucion de ĉi tiu ordo por tiuj, kiuj deziras aparteni al la nova socio. La civitanoj perdu siajn vivojn, ne klopodu konservi ilin; ili ne turmentiĝu pri nutraĵo kaj vestaro; ili estu servantoj al aliaj; ili vendu ĉiujn siajn posedaĵojn kaj donu la monon al la malriĉuloj.... vivi kiel Dio intencis por ili; vivi tiele ke povas starigi nova socio, kie regnas paco kaj harmonio. Ĉi tiu nova ordo de Dio, li diras, estu nia ĉefa koncerno.».... «Nia generacio bezonas agadon, ne nur vortojn. Ĉio, kio estas *home* ebla, jam estas farita, sed la maniero montrita de Jesuo ne estas serioze entreprenita.»

12a kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia en 1958

Tuj antaŭ la UK en Varsovio, KELI aranĝos kongreson en la kastelo *Nijenrode, Breukelen* — apud la urbo Utrecht — Nederlando.

Ĝi okazos ekde sabato la 25-a de julio, posttagmeze, ĝis sabato la 1-a de aŭgusto, matene

Anoj kaj samideanoj estas tre kore bonvenaj. Ĉeftemo de la kongreso estos:

«LA ATOMEPOKO KONCERNAS NIN ĈIUJN.»

Krome okazos studoj, distraj kunvenoj, ekskursoj, filmprezentadoj, k. t. p. La kongresejo estas en la fama kaj antikva kastelo, kiu situas en belega kaj granda parko.

Prezo de la partoprenado en la tuta kongreso, inkluzive restado, manĝadoj, tranoktoj kaj unu tuttaga ekskurso, estas proks. 95,— gld.

Informojn donos al vi:

S-ro J. van Keulen

van Beethovensingel 91-a

VLAARDINGEN - NEDERLANDO

D-ro L. L. Zamenhof rakontas:

«Vi demandas min, kiel aperis ĉe mi la ideo krei lingvon internacian kaj kia estis la historio de la lingvo Esperanto de la momento de ĝia naskiĝo ĝis tiu ĉi tago? La tuta publika historio de la lingvo, t. e. komencante de la tago, kiam mi malkaŝe eliris kun ĝi, estas al vi pli — malpli konata, — cetere tiun ĉi periodon de la lingvo estas nun, pro multaj kaŭzoj, ankoraŭ neoportune tuŝadi, — mi rakontos al vi tial en ĝeneralaj trajtoj sole la historion de la naskiĝo de la lingvo.

Estos por mi malfacile rakonti al vi ĉion tion ĉi detale, ĉar multon mi mem jam forgesis. La ideo, kies efektiviĝo mi dediĉis mian tutan vivon, aperis ĉe mi — estas ridinde tion diri — en la plej frua infaneco kaj de tiu ĉi tempo neniam min forlasadis, — mi vivis kun ĝi kaj eĉ ne povas imagi min sen ĝi. Tiu ĉi cirkonstanco parte klarigos al vi, kial mi kun tiom da obstineco laboris super ĝi kaj kial mi, malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj kaj maldolĉaĵoj, ne forlasadis tiun ĉi ideon, kiel ĝin faris multaj aliaj, laborintaj sur la sama kampo....»

(daŭrigota.)

NORVEGA KRONIKO

Red.: Astrid Mansrud

ORDINARAJ KUNVENOJ

La Urso, Sarpsborg.

27/11. Ni diskutis kion fari por plibonigi la ekonomion de Norvega Esperantisto. Poste estos prezentata nova libro, kaj fine tri ĉapitroj de nia detektivromano estis pritraktataj.

11/12. En la hejmo de ges. Birch Olsen okazis nia tradicia kristnaska tablo, ĉifoje kombinata kun programo pri la Deklaracio pri la Homaj Rajtoj. Lektoro Rosbach priparolis la Deklaracion, utiligante la afiŝan serion. Fine estis novaj tri ĉapitroj de la detektivromano prezentataj.

Klubo Esperantista en Oslo.

7/11. La kunveno estis gvidata de la vic-prezidanto s-ino Astrid Mansrud, kiu bonvenigis la ĉeestantojn kaj precipe salutis la novajn kursanojn. La unua programero estis kolorlumbild-parolado de s-ro Knut Norrvall pri «Impresoj de la Mond-ekspozicio en Brusel». La prelego kaj la bildoj estis tre interesaj kaj vere meritis la fortan aplaŭdon. Post komuna kantado estis prezentata bonhumora skeĉo «La Muŝo». La geaktoroj, kiuj ludis tre bone, estis f-ino Olaug Kathrine Nilsen, f-ino Aud Hestenes kaj s-ro Engebakken. Instruantino de la skeĉo estis f-ino Bobbi Østmo.

Post tio s-ro L. Anjer legis eltirajojn el eksterlandaj klub-bultenoj pri nia klubo. S-ro Stöp-Bowitz legis interesan esperantlingvan dankleteron de la nova finnlanda ambasadoro en Oslo, s-ino Tyyne Leivo-Larsson, kiu bedaŭris ke ŝi ne povis ĉeestis la kunvenon, sed eble venos al la decembra kunveno. Sekvis la kutima kafopaŭzo. Poste la propagand-estro s-ro Thor Magnus Carlsen aranĝis demand-konkurson pri la Esperanto-movado. Fine oni dancis laŭ akompano de s-roj Stöp-Bowitz kaj L. Sandberg.

La tre sukcesplenan kunvenon partoprenis ne malpli aŭ 70 personoj, tiel ke preskaŭ ne estis loko por ĉiuj!

Mara Vento, Haugesund.

6/11. Ingeborg Øritzland vive kaj amuze rakontis pri aŭtobus-vojaĝo lastsomere al Vieno kie okazis internacia kant-festo.

Interesa kaj valora programpunkto estis teatraĵo de Henrik Ibsen, la lasta akto de «Hejmo de pupoj» kiun brile prezentis en Esperanto la ĉefaj profesiaj geaktoroj Eva Suchardova kaj Tonda Seemann. La teatraĵo estis surbendigata en Praha lastsomere. Estis decidite aranĝi ellotadon por havigi al la klubo filmaparaton.

11/12. La kunveno enhavis ankaŭ programeron pri la deklario pri homaj rajtoj okaze de ties 10-jara jubileo.

La prezidanto memorigis pri la jubileo kaj donis la parolon al civilinĝeniero Erling Lothe kiu interese kaj instrue parolis pri la movado «Unu Mondo». Serio de 12 belaj afiŝoj kiujn eldonis Unesko en Esperanto kreis konvenan kadron al la parolado. Pri d-ro Zamenhof bele kaj bone paroladis Ingrid Loge Pettersen. Bone provizitan libro-tablon estis aranĝinta la kluba komisiulo. Amuza fiŝkaptak konkurso surplanka kaptis multan intereson. Komitato por la printempa festo fariĝis Sverre Loge Pettersen, Arne Gram, Th. Øritzland, Solveig Mathiesen, Malfried Saltvedt kaj Klara Dahl. Bele pianludis Gunnar Barane. La kunvenon finis la Himno.

La Esperantoklubo de Bergen.

2/12. S-ro Rolf Kjøde — de Skifremme — parolis pri la skiarto amuze montrante kiel facila estas la skiado. Poste sekvis filmo pri la sama temo. Ĉe la kafotablo s-ino Doris Birkeland legis la gazeton «La lumturo». S-ro Lange parolis pri kaj montris ksilografaĵojn kaj pentraĵojn. Sekvis vigla diskuto.

16/12. S-ro Kjell Offerdal parolis pri d-ro Zamenhof, lia vivo kaj laboro. Li instigis la membrojn ĉiutage legi pecon en esperanta libro. S-ro Kristian Sivertsen diris kelkajn vortojn pri la 10-jara jubileo de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj. Ĉe la kafotablo s-ino Thora Horntvedt parolis pri vojaĝo al Parizo.

KORESPONDU!

F-ino Rajna Nikolova Mineva, Petar Bogdan 15, Sofia, Bulgarujo, komencantino, deziras korespondi kun samideanoj en diversaj landoj.

F-ino Natercia Santos Ferreira, Rua Maria Pia 536-2, Lisboa, Portugalujo, 24-jara, dez. kor.

S-ro Jordan N. Jotov, str. Vladimir Zaimov 13, v I, Sofia, Bulgarujo, 38-jara historisto, dez. kor. pri arto, literaturo, muziko, k. a.

S-ro Miklòs Geza, Szinnyei Merse utca 2. III. 66, Budapest, Hungarujo, dez. kor. kaj interŝ. bildkartojn kaj poŝtmarkojn.

Norsk Esperanto-Forbund (Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgironkonto 100.30.
Kontoradrese: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo. Telefon: 42 47 79
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Esperantoforlaget A/s (Eldonejo Esperanto A/s)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgironkonto 100.30.
Kontoradrese: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo. Telefon: 42 47 79

Ĉefdelegito de Universala Esperanto-Asocio:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a, Oslo-Bryn.
Postgironkonto 133.29.

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro: S-ro Johan Hammond Rosbach, C. E. Holters vei 1 C, Sarpsborg: — Uzu tiun adreson, kiam temas pri urgaj sendaĵoj.